

Provenca Esperanto-Federacio

kvaronjara gazeto
118
aŭtuno 2019



leĝa depono ĉe BNF: ISSN 2609-5203

federacia retejo

<http://www.esperanto-provence.org>

nia federacio sur Facebook

[http://www.facebook.com/
esperantoprovence](http://www.facebook.com/esperantoprovence)

prezidanto

Pierre Oliva
Eden Park n° 99
2772 Montée du Vieux Camp
83330 Le Castellet
06 76 55 57 23
nlpolecamp@gmail.com

aliĝkotizo (kun la gazeto)

6 €

ĉeko al:

"Espéranto-Provence"
pere de via loka asocio
aŭ sendota al la kasisto
Nicole Lafitte
(ĉe la supra adreso de
Pierre Oliva)

sekretario

redaktoro kaj enpaŝiganto

Pascal Vilain
48 avenue Alexis Godillot
83400 Hyères
06 42 19 68 51
pascalvilain83@gmail.com

limdato por sendo de publikotaĵoj por la venonta n°

25-a de decembro 2019

bonvolu sendi al la supra retadreso

>>><

antaŭdankojn pro viaj kontribuajtoj

Vorto de la Prezidanto

Somero jam estas for... ni pensu nun pri la estonteco... kaj ne estas facile!

Efektive tiun jaron, okaze de la forumo de asocioj en mia urbo, estis grandega intereso pri Esperanto. De jaroj ni tion ne spertis: multe da interŝanĝoj kaj pozitivaj kontaktoj. Ni preskaŭ certis, ke tri personoj partoprenos en nia unua kurso... Bedaŭrinde venis neniu...

Mi tute ne inklinas al malespero, sed ni devos nepre trovi aliajn manierojn por interesi pri niaj kursoj kaj agadoj. Laboro kaj kuraĝo atendas nin.

Al ĉiuj membroj de nia federacio, mi do deziras aktivan cerbumadon por trovi solvojn al nia problemoj.

Ĝis la plezuro revidi vin okaze de federacia aŭ loka evento.

Pierre Oliva



enhavo

2	forumoj de asocioj	6	federaciaj esprimas sin
3	el la regionaj asocioj	7	paĝo de la komencantoj
4	vojaĝemaj federaciaj	8	mesaĝkesto agendo
5	Esperanto kaj naturismo		por la reta versio suplemento pri Reunio
aldonitaj dokumentoj		aliĝilo por staĝo en Le Beausset aliĝilo por MES 2020	

Forumoj de asocioj

Gap (05)



raportis
Monika Arnaud
(maldekstre sur la foto
apud Marie-Sylvie)

Sabaton matene, la 14an de septembro, brilis bela suno sur la pinarboj de **Embrun**.

Marie-Sylvie Julian pretigis sian budon kun interesaj ludiloj kaj apude mi starigis alian budon por informi pri Esperanto. Tiu miksaĵo helpas por allogi homojn. Infanoj rimarkas la ludojn kaj tuj deziras ludi, tiel gepatroj haltas kaj ricevas informojn pri Esperanto. Kvankam pli kaj pli da homoj scias, kio estas Esperanto, daŭre estas homoj, kiuj neniam aŭdis pri ĝi.

Por indiki nian budon, ni uzis la afiŝon de EDE, kaŝante la malsupran parton. Kiam mi aludis pri la Eŭropaj balotoj, multaj miris pri ilia ekzisto.

Dimanĉon la 15an vizitis nin eksa esperantista fervojisto; li ĝuis babili iomete sed ne pretas plu lerni. Ne multaj junuloj haltis ĉe nia budo; tro ofte ili simple trairas la aleojn sen rigardi la diversajn budojn.

Ni simple esperas, ke ni semis!

La Ciotat (13)

La Forumo de Asocioj en La Ciotat okazis la 14an de septembro. Ideala vetero, bona lokigo inter UNICEF, Ĝemelaj urboj kaj asocioj pri lingvoj (provenca, japana, angla).

Michel, Alain kaj Renée deĵoris sub la nova tendo aĉetita de Esperanto-Provence. Nur malmultaj vizitantoj ne sciis pri Esperanto aŭ aŭdis la vorton unufoje. La plimulto jam bone konas nin eĉ se ili ne vizitas la kurson.

Prezentleciono okazis merkrede la 18an en CIQ-Font-sainte, impasse Val d'Azur.

Senpagaj publikaj kursoj okazos samloke, merkrede je la 17.30 por komencantoj, je la 18.30 por progresantoj.

Informoj: esperanto.laciotat@wanadoo.fr



La ttt-ejo de la Domo de Asocioj permesas aliron al informoj pri ĉiuj asocioj, kiuj registriĝis ĉe la komuna giĉeto. Pro malfacileco enmeti informojn pri ni, mi vizitis persone, kaj la respondeculino, vane dufoje sed sukcese la trian, enmetis informojn pri Espéranto-La Ciotat. Mi baraktis por ke ni aperu en du rubrikoj: edukado kaj lingvo-kursoj plus kulturo.

https://asso.laciotat.com/Annuaire_Associations

Marseille (13)



Dimanĉe la 8an de septembro, Marseille-Espéranto partoprenis la forumon de asocioj Vivacité. Kiel kutime, deĵoris Thierry, Chantal, Marc, Renée kaj parte novuloj Floréal kaj Danièle.

Nia budo estis bonege lokita ĉe la ĉefa enirejo, kaj komence de aleo dediĉita al la lingvoj. Vizitis nin multaj personoj, kaj unufoje, ni aŭdis de pli ol deko, ke ili scias pri Esperanto ĉar la patro/la patrino/la bopatrino/la onklo/la avino ktp lernis aŭ lernas. Pro la ventego, ne eblis montri afiŝojn, tamen multaj interesiĝis. Brazilano tute klare diris, ke la problemo estas politika, ligita al decido de regantoj. Ni vidos, kiom da homoj vizitos la kurson aŭ kiom da aliĝos al retkurso!

por La Ciotat kaj Marseille raportis Renée Triolle

Le Beausset (83)

Ĉi tiun jaron okazis tre bela forumo de asocioj en nia vilaĝo, kie la etoso estis multe pli agrabla ol kutime. Multe da personoj interesiĝis pri nia lingvo kaj venis malpli da dogmaj oponentoj.

Ni propagandis por instruado de Esperanto en lernejoj kaj defendo de la patrinaj lingvoj.

La najbara budo estis tiu de asocio pri la malfacileco eduki infanojn, vizitita de multaj familioj. Ĉar hazarde ni havis «packolombon» plenan je bombonoj... venis al ni multe da infanoj... sekvataj de la gepatroj.

Tio kontribuis al la bona etoso je nia budo!

Ankaŭ pluraj membroj de nia klubo vizitis nin kaj helpis vivigi nian budon per babiladoj.



Do tre bela kaj riĉa tago, sed ni ne scias, ĉu tio venigos kelkajn novajn samideanojn en nian klubon.

raportis Nicole Lafitte kaj Pierre Oliva

El la regionaj asocioj



13 - Espéranto - La Ciotat

Renée Triolle

Vizito de ĉinaj esperantistoj

Jam trian fojon, **Trigo** el ĉina urbego Wuhan, ĉe la Flava riverego, vizitis nian regionon, sed unuan fojon kun sia edzino, afabla kaj helpema komencantino. Ili haltis du tagojn en La Ciotat antaŭ rapida vizito al Saint-Raphaël por revidi malnovajn amikojn.

Dum sia restado, ili ĉefe guis la maron kaj banadon, multe fotis sed ankaŭ interesiĝis pri la naturo ("botanika" promenado, kiam komputila programo donas la nomon de fotita planto; serĉado de spuroj de aproj, kiuj vizitis nin dum la komuna vespermanĝo).

Kunvenis la 3an de aŭgusto dek unu homoj por provenca pikniko kun olivkremo (*tapenade*), moruo (*brandade*), olivoj, legommiksaĵo (*ratatouille*), lokaj ruĝa kaj rozea vinoj, kristnaska kuko (*pompe à l'huile*) kaj boatformaj kuketoj (*navettes*).



Por Floreal (maldekstre) kaj lia patrino, estis la unua kontakto kun eksterlanda esperantisto.

Ni pridiskutis diversajn temojn kaj lernis interalie, dank' al Nini, kiu laboris en apoteko, ke en Ĉinio, ŝelo de cikado estas uzata kun aliaj sekigitaj plantoj por preparaĵo kontraŭ gratado! Ĉu esplorenda vojo por komercado kun Ĉinio?



83 - Espéranto-Hyères

Pascal Vilain



foto: Sylvain Mouhot - Var-Matin Hyères

En la somera numero de nia gazeto, mi finis artikolon per la jenaj vortoj: «Ni esperas, ke la titolo «Espéranto-Hyères» ne estos efemera.»

Nu, Esperanta vivo ree ekis en nia urbo. Ni pensis pri eventuala lingva kafejo: ĝi okazis jaŭdon la 26an de septembro kaj kunigis 7 samideanojn, el kiuj 5 loĝantoj de Hyères (kvar kiuj ĵus instaligis tie + unu kiu delonge loĝas en la urbo, kaj jam partoprenis en staĝo MES en Agay). Du geamikoj, Carmen el Saint-Raphaël kaj Alain el Tulono, plezurigis nin per sia ĉeesto.

La loka ĵurnalo Var-Matin anoncis la eventon kaj – tute surprize – sendis ĵurnaliston por intervjuo sekvata de longa babilado kun multaj demandoj pri nia movado. Ĉiu estis petita rakonti pri la kialo de sia esperant-istiĝo. Ni poste interŝanĝis ideojn pri eblaj agadoj en Hyères: kunlaborado kun "Accueil des Villes Françaises", stud-staĝoj, gvidataj promenadoj...?

Vojaĝemaj federacianoj



Nicole Lafitte kaj Pierre Oliva

Komence de marto, ni partoprenis en la 26-a staĝo «Trans-Pirenea Esperanta Koruso» en la ĉarma vilaĝo La Bastide sur l'Hers. Ĉiuj kondiĉoj kuniĝis por pasigi feliĉan semajnon: amikega kaj ĝoja etoso; komfortaj loĝejoj en dometoj de la Feria Centro; bongustaj nutr-aĵoj kiel en Suda Francio; ne deviga ĉeesto al koruso por geakompanantoj. Tiel kune kantis en Esperanto lokuloj, Belgoj, Svis-Germano, Kroato, aliaj Francoj kiel Céline, Monique kaj Francis Bernard (gredaktoroj de «Espéranto-Info»), ĉiuj inter 9 kaj 84 jaraĝaj.

La korusa estrino, Rineke Hoens, el Nederlando, estis muzike postulema sed tre pedagogia kaj amika dum kursoj, kiuj daŭris 5 horojn tage. Ŝia repertuaro enhavis polifoniajn kaj popolajn kantojn 4-voĉajn, ĉefe germanajn kaj skandinavajn. Estis ankaŭ du kantoj de «Josquin des Prés», fama belg-franca komponisto el la renesanca periodo. Pro la 8a de marto, ŝi oportune aldonis du kantojn dediĉitajn al virinoj por agnoski iliajn dignon kaj liberecon.

Estis multaj eblaj programeroj post-tagmeze antaŭ la sesa: belaj kamparaj promenvojoj; vizito de la katara Kastelo Montségur; malkovro de la laboro de manlaboristo, kiu fabrikas objektojn kaj kombilojn el korno; legadoj dank' al la riĉa biblioteko de la Centro. Kelkaj ankaŭ iris ĝis la neĝkovrita montaro, aliaj desegnis kaj pentris kun Pierre.

Vespere ni elektis babiladojn, interkonatiĝojn, plus du prelegojn: «Historio de Kroatio» far Alan Neven; «legi, skribi, kanti facile per gestoj» far Brigitte de la asocio «La boîte aux lettres».

Dimanĉon la 30an de junio, tri Provencanoj, inter kiuj du el Le Beausset, partoprenis en la 24a korusa festivalo "Voix sur Berges", en Parizo.

Sed tio venos – eble – en la estonteco. Unue, ni ĝuu la ĵus kreitan lingvan kafejon, kiu de nun okazos la lastan merkredon de ĉiu monato je la tria etaĝo – mirinda tegmenta teraso! - de la Hotelo «Ibis Styles Centre Gare», fronte al la stacidomo de Hyères. Ĉiuj estas tie bonvenaj por la venonta renkontiĝo, merkredon la 30an de oktobro.



La staĝo finiĝis per du koncertoj: la unua en la vilaĝa emeritejo, la dua en la proksima departemento Aude, en la bela urbeto Fanjeaux, alte lokita. Tie, kun alia bretona koruso, ni proponis spektaklon por la loka publiko, kiun ni entuziasmigis.

Ĝis la venonta staĝo!

Kaj... ankaŭ vi venu!

Informoj: <http://esperanto.ariège.free.fr>

tutpeko@aliceadsl.fr ; lire-ecrire-chanter.com

LE BEAUSSET

Espéranto Provence : et en plus... ils chantent !

Invités au 24^e festival "Voix sur berges" de Paris, qui a rassemblé 180 chorales et 5 000 chanteurs il y a quelques jours le long de canal Saint-Martin, trois sociétaires de l'association Espéranto Provence (présidée par Pierre Oliva), dont deux citoyens du Beausset, ont directement participé, au sein de la chorale française "Interkant", à ce formidable événement mélodique international. En finale, l'ensemble des choristes présents, auxquels s'était spontanément jointe l'immense foule des spectateurs, a entonné à l'unisson la célèbre "Ritournelle du canal Saint-Martin", "Göttingen" de Barbara et "La Marseillaise", version pacifiste, conçue et orchestrée par le groupe "Les Polyssons" du XX^e arrondissement parisien... Et tout cela, naturellement, en espéranto dans le texte!



Les choristes profitent de chaque occasion pour répéter leurs gammes. (Photo DR)

L'ensemble vocal "Interkant" regroupe des espérantistes de tous horizons et tous niveaux, qui aiment par-dessus tout chanter et partager. Ces derniers se retrouvent en stage deux fois par an au château de Grésillon, en Anjou, centre culturel espérantiste, sous la direction

technique de la chef de chœur bulgare M^{me} Zdravka. Ensuite, ils sont invités à travailler seuls un répertoire composé de chants de tous les pays traduits en langage espéranto, avant de se produire en concert. L'année prochaine, les choristes espérantistes seront

présents à la fête de la paix de Rennes (Bretagne), avant d'aller participer au congrès international qui se tiendra à Montréal (Québec) et de revenir sur les berges du canal Saint-Martin pour s'impliquer, entre-autres, dans la 25^e édition du festival "Voix sur berges".

J. L.

104-a Kongreso de UEA en Lahti, Finnlando

Rosy Inaudi kaj Marc Gallardo

El la 900 partoprenantoj, kvar Provencaj kongresis en Lahti, urbo ĉirkaŭata de lagoj kaj arbaroj, je 100 km norde de Helsinko.

La kongreso okazis ĉe la glitkurejo de la loka hoke-teamo "Pelikanoj".

Plejmulto da prelegoj okazis en malgrandaj ĉambroj, kiuj kutime estas uzataj kiel loĝioj por spektantoj kun miriga vido al la sketejo. Ni ne povas diri, ke ili vere plaĉis.

La spektakloj, la solenaj malfermo kaj fermo okazis en la glitkurejo. Okaze de la oficiala malfermo, ni feliĉis aŭdi la Esperon interpretitan simfonie. Ĝi entuziasmigis la spektantaron. Estante je la origino de projekto pri reorkestrado de la himno, ĉi tiu interpretado kortsuŝis nin.

Ĉar lia prezidanteco finiĝis, Mark Fettes lastfoje prezidis la kunsidojn.

Duncan Charters, Usonano, anstataŭas lin.

Sciencaj kaj artaj konferencoj, Esperanto-kursoj kaj oficialaj kunsidoj de UEA konsistigis ĉi tiun kongreson.

Kaj male al aliaj jaroj, la nacia vespero, kiu okazis en tute alia loko, ne proponis la kutimajn naciajn spektaklojn, sed cirkprezentadojn, kiuj intermiksiĝis kun muzikeroj.

Ni ankaŭ spektis la tradician futbalmatĉon inter teamoj de esperantistoj kaj lokuloj. La esperantistoj kutimas perdi, sed ĉifoje ili gajnis 5 je 2.

La nova himno certe stimulis kaj vigligis niajn ludantojn!

Ĉar ni membras en INOE (Internacia Naturisma Organizo Esperanta), ni deĵoris ĉe budo dum la movada foiro por prezenti nian asocion. Ni ankaŭ organizis laborkunsidon pri la historio de naturismo kaj ties vivo en la mondo.



Rosy prelegis pri INOE.



Marc deĵoris por INOE dum la movada foiro.

Ni jam preparis renkontiĝon por la kongreso 2020 en Montrealo kaj planas iri al Belfasto en 2021 por la 106-a kongreso.

Esperanto kaj naturismo

Thierry Spanjaard

La valoroj de Esperanto kaj naturismo tute kuniĝas!

Por ambaŭ, la respekto al aliuloj estas esenca.

Naturismo uzas nudecon por rekrei ligan inter homoj kaj naturo; Esperanto uzas la internacian lingvon por plifortigi la ligojn inter la homoj.

La Esperanta mondo estas riĉa je asocioj. Aparte gravas **INOE (Internacia Naturista Organizo Esperantista)**, kiu celas kunigi Esperantajn naturistojn kaj antaŭenigi naturismon kaj Esperanton.



INOE eldonas kvaronjaran bultenon: Naturista Vivo

foto plukita el la TTT-ejo de INOE

ANP (Association naturiste phocéenne) estas la naturisma asocio kun la plej granda kvanto da esperantistoj en la mondo, kaj **Espéranto-Provence** estas la regiona Eo-federacio kun la plej granda nombro da naturistoj.

Sendube parte respondecas pri tiu fakto kelkaj Esperantaj naturistoj, kiuj emis dividi sian feliĉon kun siaj amikoj...

De ne tre longe, ANP kaj Espéranto-Provence havas novan rekordon: membroj de nia federacio estas ankaŭ INOE-estraranoj. Rosy Inaudi estas ĝia sekretario kaj Thierry Spanjy ĝia prezidanto.

Naturismo kaj Esperanto plu kaj plu akiras iom pli da agnosko: dum la venonta naĝkonkurso organizita de INF-FNI (International Naturalist Federation/Fédération Naturaliste Internationale) en oktobro en Parizo, teamo de esperantistoj estos unuafoje agnoskita samnivele kiel nacioj.

Internacia Esperanto-teamo konkursos kontraŭ franc-

La federacioj esprimas sin...

Rosy Inaudi

Mi estas esperantisto, naturisto kaj ekologiisto... kaj profunde en mi, ĉiam sentis konfuze, ke ekzistas inter tiuj tri konceptoj komunajn valorojn.

Unuavide, por nespertuloj, la valoroj, kiujn esploras Esperanto, naturismo kaj ekologio, aperas malproksimaj unu de la alia:

- Por ili, Esperanto estas nur konstruita lingvo, permesanta al parolantoj de malsamaj landoj kompreni unu la alian.
- Ili opinias, ke naturismo estas maniero vivi por homoj serĉantaj bonstaton kaj kontakton kun naturo.
- Kaj koncerne ekologion, ili kredas, ke ĝi nur utilas por protekti la medion.

Sed ĉio estas multe pli ol tiuj simplaj signifoj... Pli ol bazaj konceptoj, Esperanto, naturismo kaj ekologio transdonas aliajn valorojn, kiuj sin interligas forte.

La 1a artikolo de la homaj rajtoj, adoptitaj de la esperantistoj, deklaras: «Ĉiuj homoj estas egalaj kaj liberaj laŭ digno kaj rajtoj. Ili posedas racion kaj konsciencon, kaj devus konduki unu al alia en spirito de frateco.»

Zamenhof songiĝis pri repacigo de la homaro per Esperanto.

Li songiĝis pri frata mondo, sen perforto, kie ĉiuj respektus la aliajn kaj iliajn kulturojn.

Li parolis pri homaranismo. Ekzistas tiu malnova songo en la koro de ĉiu esperantisto, ĉu ne?

Por naturisto, ia vivarto superas la serĉadon de bonstato. Li estigas ligojn inter si kaj la naturo, kaj trans la respekto, kiun li dediĉas al ĝi. Nude, li malkaŝas siajn difektojn kiel homo, sen artifiko, vundebla. Li respektas aliajn en iliaj difektoj kaj petas nur unu aferon: esti respektata kia li estas.

Koncerne ekologion, ĝi estas la rilato inter la individuo, lia aktiveco kaj la medio por la postvivado de la specio. Tamen, homo estas integra parto de la naturo, li povos postvivi nur se li konservos ĝin. Tiu konsidero nepre generas sintenojn de respekto al la medio.

Kaj se ni foriras el politika ekologio, ĝi estas la respekto de ĉiuj homoj kaj iliaj kredoj, kiuj gravas.

Fosante iomete la respektajn konceptojn, ni vidas, ke tiu valoro estas komuna.

Nu... respekto estas fonto de paco, ĉar ĝi estas la fonto de ĉiuj indulgaj sintenoj inter homoj.

Do... por mondo, kie harmonio regas, ni ĉiuj estu Esperantistoj, Naturistoj kaj Ekologiistoj...

Teksto plukita el la retejo de INOE, kun la permeso de la eldonanto kaj de la aŭtoro.

Gilles Wallez

Kluba krizo-situacio

Ĉu la nuna agmaniero de la restantaj Eo-kluboj plu taŭgas? Ni travivas gravan momenton de nia movado, kiam nia malnova generacio iom post iom malpliiĝas (ni estu realistaj!) kaj kiam ni devas favorigi la alvenon de nova generacio pli konektita al interreto kaj al virtuala mondo.

Kiel akompani ĉi tiun transiron?

La respondo ne povas esti simpla: ni ankoraŭ konservu la klubojn, kiuj restas por nia malnova generacio, sen provi revivigi tiujn, kiuj mortis, ĉar tio estus malŝparo de tempo kaj nenecesa penado: ĉi tiu evoluado estas ja neinvertigebla.

Do samtempe ni devas centri niajn penojn ĉe interreto por la alveno de la nova generacio.

Kiuj estos ties agadoj?

Ni distingu inter kolektivaj agadoj kaj individuaj rilatoj.

Pri la duaj, ni ne povas zorgi. Male, la unuaj estas fundamentaj se ni ne volas iri al disiĝo de la Esperanta movado.

Kiel fari? Antaŭenigi la formadon de virtualaj Esperanto-kluboj ĉe Interreto per la ebligado de virtualaj kunvenoj, kiel tiuj jam efektigitaj de EDE.

Krei eventojn, kie tiuj Esperantaj retumantoj povos renkontiĝi fizike de tempo al tempo.

Kompreneble ekzistas ankaŭ eksteraj parametroj, kiuj ne dependas de ni, kiel la nuna geopolitika kunteksto, kiu favoras la anglalingvan mondon... sed tio daŭros nur iom da tempo, do ni devas pacienci kaj ne senkuraĝiĝi: ni estas esperantistoj, ĉu ne?

Ni ne forgesu, ke esperantistaj generacioj antaŭis nin kaj ke aliaj sekvos... ni estas nur la estanta ligilo en ĉi tiu ĉeno...

Do ni vivu ĉi tiun momenton!

Paĝo de la komencantoj

Meteologio

En français, **météo** est le diminutif familier de météorologie.

En espéranto, **meteo** = tout phénomène météorologique.

"Pluvo, neĝo, tornado estas meteoĵoj."

En espéranto, il faut traduire le mot **météorologie** par **meteologio** ou **meteorologio**.

De même, le mot **météorologue** est traduit par **meteologo** ou **meteorologo**.



prévisions météorologiques

= veterinformoj

= prognozoj de la veterstato

= veterprognozoj

= meteologiaj prognozoj

> informoj, kiujn la veteroficejo donas ĉiutage, kaj kiujn oni trovas ĉe gazetoj, rettelefonoj, radioelsendoj, televidelsendoj,...

bulletin météorologique

= meteologia bulteno

> Ĝi informas pri la vetero de difinita tago aŭ pri la deduktita evoluo en pli longa tempo.



Plurelekta demandaro

laŭ verkoj de Robert Llorens
eldonitaj de *Esperanto-Info*

1 - gramatika

a) La frato de ŝi estas frato.

1 - lia ; 2 - ŝia ; 3 - ĝia

b) Li havas hundinon, hundino estas nigra.

1 - lia ; 2 - ŝia ; 3 - ĝia

c) Ŝi havas hundon, hundo estas granda.

1 - lia ; 2 - ŝia ; 3 - ĝia

2 - vorto-trezora

ĉ) elektu "albo", "padelo" aŭ "ektagiĝo" por traduki la francan "aube"

1 - 1ère lueur du jour:

2 - mécanique:

3 - vêtement religieux:

d) elektu "neniel", "neniom" aŭ "tute ne" por traduki la francan "aucunement"

1 - à aucun degré:

2 - en aucune façon:

3 - pas du tout:



Superzam'

proponita de

Jean-François Cousineau

1. Kiom da homoj partoprenis la 1an Universalan Kongreson en 1905?

a- 688 b- 891 c- 1033

2. Kiu verkis la poemaron *La vagabondo kantas* en 1933?

a- Kabe b- Baghy c- Grabowski

3. En kiu jaro aperis *Flugdrako*, la 1a disko de Kajto?

a- 1989 b- 1992 c- 1998

4. En kiu urbo forpasis Zamenhof?

a- Vilno b- Varsovio c- Bjalistoko

5. Kiu korelativa ekaĵo signas demandon?

a- t b- ĉ c- k

6. Kiu estas la plej ampleksa lando en la mondo?

a- Ĉinio b- Kanado c- Rusio

Plurelekta demandaro

1 - gramatika

a: 3 ; b: 1 ; c: 3

2 - vorto-trezora

ĉ1: memfido ; ĉ2: certeco ; ĉ3: asekuro

d1: atento ; d2: prizorgemo ; d3 : afablaĵo

Solvoj de la demandoj

en EP 116

printempo 2019

Superzam'

1 b > pro ekmilito

2 c > Baghy 3 c > Masko

4 c > lia edzino

5 a > el

6 a > Hindio



El la mesaĝkesto de la legantaro

Pri la kampanjo por la Eŭropaj balotoj:

Berto Ŝuman

Indas danki aparte al Renée Triolle, kiu faris pli ol ke eblas.

Pierre Dieumegard

Jes, ni dankas al Renée Triolle, al Philippe Chavignon, kaj ankaŭ al ĉiuj, kiuj gluis afiŝojn, zorgis pri la bona alveno de balotiloj kaj aliaj agoj.

Nome de la Konsilio de Europe-Démocratie-Espéranto



À noter sur votre agenda

dans notre fédération

novembre 30 / décembre 1 - Le Beausset

Fin de semaine culturelle

(bulletin d'adhésion joint à ce n°)

février 29 / mars 7 - Les Issambres

MES (Méditerranée Esperanto-Semajno)

(bulletin d'adhésion joint à ce n°)

1er jeudi de chaque mois - 18 h - Marseille

Café linguistique - Brasserie les Danaïdes

4 square Stalingrad, 13001 Marseille

dernier mercredi de chaque mois - 18 h - Hyères

Café linguistique - bar de l'hôtel Ibis Gare

45 rue Edith Cavell (face à la gare)

en France

octobre 18-20 - Paris

Concours international naturiste de natation

participation de nageurs espérantistes

esperanto-naturismo.org/blog/

octobre 21-25 - Bouresse (86), Kvinpetalo.

Séminaire pédagogique avec Katalin Kováts.

<http://www.kvinpetalo.org/?lang=fr>

octobre 26 / novembre 3 - Baugé (49)

Château de Grésillon - stage Aŭtuno

<http://gresillon.org/s4fr>

Alitemaj mesaĝoj

Philippe Combot

Malgraŭ via milda pesimismo pri la vivo de la kluboj, mi konstatas, ke la gazeto estas enhave riĉa, tiel riĉa, ke vi ne povis la tutan materialon enmeti.

Maggy kaj Philippe Combot

Per nia gazeto, nia historio fariĝis fama en la tuta mondo! Skribis al ni Malcolm Jones el Britio: li legis la gazeton kaj eksciis pri nia foriro. Nia gazeto havas mondan gravecon. Ĉu vi konsciis pri tio?

respondo de la red.

Kompreneble mi bone konscias pri tiu graveco! Ĉu povas esti, ke iu(j) prie dubas? (mdr=multe da ridoj)

février 15-22 - Verniolle (09)

27ème stage de chorale en espéranto

tutpeko@aliceadsl.fr

en Europe et ailleurs dans le monde

De nombreuses rencontres réunissent toute l'année des espérantistes sur des thèmes divers.

Si l'envie vous prend de quitter les frontières de notre pays pour parler notre langue sans "krokodili", n'hésitez pas à demander plus d'infos sur les dates et lieux de ces rencontres en envoyant un message à l'adresse suivante: pascalvilain83@gmail.com

ou consultez: <https://eventaservo.org/>



GDPR (Ĝenerala Datuma Protekta Regulo de la Eŭropa Unio)

Espéranto-Provence kolektas viajn nomon, retadreson kaj poŝtadreson. Tiuj informoj estas uzitaj nur por la bezonoj de la asocio. Vi estas la posedanto de viaj personaj informoj. Vi rajtas aliri al viaj personaj informoj kolektitaj de ni. Vi rajtas ankaŭ peti forviŝon de la tuto aŭ de specifa parto.

Transmaraj novaĵoj el la fora Reunio

Je la paĝo 7 de la numero 117 (somero 2019) de nia gazeto, vi povis legi pri la "baldaŭa foriro de Maggy kaj Philippe Combot al Reunio pro profesia (kaj ankaŭ plezura?) kialo" kaj pri la fakto, ke "la paro el Saint-Mandrier detale preparis siajn transloĝigon kaj instaligon sur tiu forega, kvankam francdepartementa, insulo."

Mi havis la plezuron ricevi de ili tekston kaj foton. Ja eĉ transmari, ili ne forgesas siajn geamikojn el la federacio, kies membroj ili plu estas.

Pascal Vilain

Maggy kaj Philippe Combot

Reunio: unuaj impresoj

Ni alvenis al la insulo Reunio en Aŭgusto, t.e. en vintro, kiu ĉi tie estas senpluva kaj relative malvarma sezono: ne pli ol 26 gradoj dum tago en la ĉefurbo Saint-Denis.

Tiu lando estas miksaĵo de ekzotikaj kaj Francaj trajtoj. Oni retrovas ĉi tie la butikojn, la produktojn kaj la administraciojn de Francio. Sed oni trovas ankaŭ multajn elementojn de aliaj civilizoj: ĉiun vesperon aŭdeblas la muezino, kiu vokas al la preĝo el la moskeo; en la urbo estas aĉeteblaj la spicoj uzataj de Hindoj; oni povas vidi Tamilajn templojn por praktiki hinduismon, kaj Ĉinajn templojn dediĉitajn al dioj, kiel Guandi.


Ni multe uzis la busan reton, kiu tre bone funkcias tra la tuta insulo. Sed en certaj aŭtobusoj oni devas frapi per siaj manoj por signi al la ŝoforo, ke oni deziras eliri ĉe la venonta haltejo. Tio estas malfacila afero, kiam oni ne konas la lineon. Aŭ oni devas zorge studi la sinsekvon de la haltejoj kaj atenti dum la irado, aŭ oni devas demandi la aliajn kunveturantojn. La dua solvo havas grandan avantaĝon: tiel oni rapide babilas kun nekonatoj, kaj ni konstatis, ke la Reunianoj tre volonte alparolas homojn. Krome ili estas tre helpemaj. Danke al la helpo de pluraj homoj ni ricevis tre bonan akcepton kaj komencas senti nin hejme.



Mikaela
kun
Maggy
kaj Philippe

Ni organizis renkonton kun esperantistino, Mikaela Savignat-Belhôte, kiu estas emerita bibliotekistino kaj aktivas en asocioj (ŝi ĵus kunlaboris por ekspozicio pri la perfortaĵoj suferataj de la virinoj). Kun ŝi ni babilis kaj promenis en parko en la centro de Saint-Denis. Ŝi partoprenis staĝon en Grezijono dum ĉi tiu somero kaj tie renkontis nian Belgan amikino Liliane (vidu la artikolon en la pasinta gazeto), kiu peris la interkonatigon, kune kun Monique Prezioso, kiu donis ŝian adreson.

En venonta artikolo ni rakontos pri niaj ekskursoj, per kiuj ni malkovris grandiozajn pejzaĝojn, kaj eble pri aliaj renkontotaj esperantistoj.



Reunio estas dependa teritorio kaj transmara departemento de Francio en Hinda Oceano.

Landkodo: RE

Nacia nomo: Département d'Outre-Mer de la Réunion

Departementa numero: 974

Areo: 2 512 km²

Loĝantaro: 833 944

Adm. centro: Saint-Denis

Lingvoj: franca kaj Reunia kreola lingvo.

fonto: Vikipedio

KULTURA SEMAJNFINO en LE BEAUSSET - 2019
la sabaton 30-an de novembro kaj dimanĉon 1-an de decembro

stagejo: Maison des Frères, 16 rue Estienne d'Orves – 83330 Le Beausset

kiel atingi ĝin? En Le Beausset, ŝildoj gvidos vin. Sed antaŭe:

trajne: stacidomo de Saint-Cyr; buse: el La Ciotat aŭ Toulon / buslinio 13

aŭtomobile: aŭtoŝoseo La Ciotat-Toulon, elirejo La Cadière

programo: sabate: ekde la 9a: akcepto, kafo - 10a/12a: kursoj - tagmanĝo - 15a/19a: kursoj - vespermanĝo - 20a30: distraj kaj/aŭ klerigaj programeroj / **dimanĉe:** 9a/12a : kursoj - tagmanĝo

laborgrupoj:

1 > Mari-Roza Vilain: paroligo de komencantoj

2 > Pascal Vilain: plurflanka lingvo-uzado por progresantoj

3 > Renée Triolle: diskutoj pri la temo "Internacia Jaro de indiĝenaj lingvoj"

manĝoj: Kiel kutime, pri ili zorgos Pierre Oliva.

tranoktado: Atentu > ĉijare estos nur 3 aŭ 4-litaj dormoĉambroj (littukoj surloke - kunportu tualettukon) – aŭ eblos tranokti en hotelo > La Calèche (Le Beausset) - 04 94 98 70 18 – ekde 68 € Auberge du Camp (Le Castellet) - 04 94 90 71 52 aŭ 06 43 02 99 87– ekde 65 €

tarifoj: por la tuto > aliĝkotizo (kun paŭzaj kafoj) + ĉiuj manĝoj + tranoktado: 80 € (paro: 152 €)

aŭ se vi ne dormos surloke > aliĝkotizo: 22 € (36 € por paro) + unuopa manĝo kun trinkaĵo: 12 €

por pliaj informoj: Pierre Oliva - 06 76 55 57 23 / nlpolecamp@gmail.com

resendota, antaŭ la 17a de novembro, kun la pago per ĉeko
al Pierre Oliva - 99 Eden Parc, 2772 Montée du Vieux Camp, 83330 LE CASTELLET

nomo:

adreso:

retadreso:

telefonnumeroj (fiksa kaj/aŭ portebla):

- aliĝas al la Kultura Semajnfino en Le Beausset la 30-an/11 kaj 1-an/12 2019
- elektas la jenan laborgrupon: 1: 2: 3:
- partoprenos en la **tuta aranĝo kun tranoktado**, kaj pagas do **80 € (por paro : 152 €)**
- aŭ pagas la aliĝkotizon (22 € - aŭ 36 € por paro)
kaj mendas la jenajn manĝojn (pagas do 12 € x = €)
sabatan tagmanĝon: sabatan vespermanĝon: dimanĉan tagmanĝon:
sume: aliĝo € + manĝoj € = €
- havas apartan dieton (precizigu, ni provos kontentigi vin):

pago per ĉeko al Espéranto-Provence

/!\ la partoprensumo ne estos redonita
en okazo de neĉeesto aŭ malfrua nuligo (malpli ol tri tagoj)

FIN DE SEMAINE CULTURELLE AU BEAUSSET - 2019
samedi 30 novembre et dimanche 1er décembre

lieu : Maison des Frères, 16 rue Estienne d'Orves – 83330 Le Beausset

comment nous atteindre ? Dans Le Beausset, des panneaux vous guideront. Mais avant :

train : gare de Saint-Cyr ; car : de La Ciotat ou de Toulon / autobus 13

voiture : autoroute La Ciotat-Toulon, sortie La Cadière

programme : **samedi** dès 9h : accueil, café - 10h/12h : cours – déjeuner - 15h/19h : cours – dîner - 20h30 : programme distrayant et/ou instructif. **dimanche** : 9h/12h : cours ; déjeuner

groupes de travail :

1 > Mari-Roza Vilain : conversation pour débutants

2 > Pascal Vilain : utilisation de la langue selon plusieurs facettes, pour progresser dans sa pratique

3 > Renée Triolle : discussions sur le thème "Année Internationale des langues autochtones"

repas : Comme d'habitude, Pierre Oliva s'en chargera.

nuitée : **Attention : cette année, il n'y aura que des chambres à 3 ou 4 lits** (draps et couv. fournis)

– ou possibilité de dormir en hôtel > La Calèche (Le Beausset) - 04 94 98 70 18 – à partir de 68 €

Auberge du Camp (Le Castellet) - 04 94 90 71 52 ou 06 43 02 99 87 – à partir de 65 €

tarifs : **prix complet > adhésion (avec pauses-café) + tous les repas + nuitée : 80 € (couple : 152 €)**

ou prix sans nuitée : adhésion : 22 € (36 € pour un couple) + chaque repas avec boisson : 12 €

pour informations : Pierre Oliva - 06 76 55 57 23 / nlpolecamp@gmail.com

à renvoyer avant le 17 décembre avec le paiement par chèque
à: Pierre Oliva - 99 Eden Parc 2772 Montée du Vieux Camp 83330 LE CASTELLET

nom :

adresse :

courriel :

téléphones (fixe et/ou portable) :

- s'inscrit à la fin de semaine culturelle au Beausset les 30/11 et 1/12 2019
- choisit le groupe de travail suivant : 1 : 2 : 3 :
- participera à **toute la rencontre avec nuitée sur place** et paie donc **80 € (pour un couple : 152 €)**
- ou paie l'adhésion au stage (22 € - ou 36 € pour un couple)
souhaite les repas suivants (et paie donc 12 € x = €)
samedi midi : samedi soir : dimanche midi :
- total : adhésion € + repas € = €
- a un régime particulier (veuillez préciser, nous essaierons de vous satisfaire) :

paiement par chèque à l'ordre de Espéranto-Provence

⚠ la somme ne sera pas remboursée en cas d'absence ou d'annulation tardive (moins de 3 jours)

MEDITERANEA ESPERANTO-SEMAJNO

2020



Restadejo Val d'Esquière – Les Issambres – Francio (Lazura Marbordo)

29an de Februaro- 7an de Marto 2020

Ĉu ankoraŭ frostas en via regiono ? Tuj venu al la Mediteranea Maro, kie floras mimozoj kaj migdalarboj ! Vin atendas amika familia etoso, belegaj pejzaĝoj, bona ripozo kaj lazura maro...

INFORMOJ KAJ ALIĜOJ :

- **Monique Prezioso**, 92 allée des Harkis, FR 83700 Saint-Raphaël, Francio
prezmoni@hotmail.com - tel. 0033 (0)4 94 83 06 88
- **Christine Graissaguel**, Les Iles d'Or-A, 59 rue du Progrès, FR 83600 Fréjus
kris_grai@hotmail.fr - tel. 0033(0)4 94 95 66 18

ALIĜILO AL M.E.S. 2020

MEDITERANEA ESPERANTA SEMAJNO - SAINT-RAPHAËL - FRANCIO

NOMO de la 1a partoprenanto : Naskiĝdato.....
NOMO de la 2a partoprenanto : Naskiĝdato.....
NOMO de la 3a partoprenanto : Naskiĝdato.....
Adreso :
Tel. : Retadreso :

► Mi partoprenos de la 29a de Februaro ĝis la 7a de Marto 2020 : jes ne

 **Sendu al Christine Graissaguel** (vidu adreson ĉi-supre)
(antaŭ la 1a de decembro 2019)



ĜENERALAJ INFORMOJ

Alveno : De la stacidomo St Raphaël: aŭ per **buso n° 7601 al Saint-Tropez** ĝis haltejo **Le Val d'Esquière Les Issambres**, aŭ per taksio.

Akcepto : sabaton la 29an de Februaro - 15:00 - **Fermo** : sabaton la 7an de Marto - 14:00 (post la tagmanĝo).

Kurs-horaroj : 9:00-12:00 kaj 18:00-19:00

Partopreno en kursoj (4-nivelaj) : Elektu vian deziratan kurson en la ĉi-suba tabelo.

Nomo/persona nomo	Kursniveleoj	Kursgvidantoj	Niveleoj
	1	Christine GRAISSAGUEL	Vera komencanto
	2	Elisabeth LE DRU	Komenc-parolanto
	3	Pavla DVORAKOVA	Progres-parolanto
	4	Mikaelo BRONŜTEJN	Diskuto/analizo

Liberaj posttagmezoj por : bankuracado en proksima marakva banejo (800m), vizitado de Fréjus (klostro), Saint-Raphaël (muzeo), Nico, Menton, Maures-monteto (mimozo kaj piedekskursado), Saint-Tropez, Sainte-Maxime, Bormes-les-Mimosas, bazaro en Ventimiglia (Italio, nur vendrede), ktp.

Ne forgesu viajn marŝuojn por piedekskursi sur montetaro.

Distraj vesperoj far la hotelo, Esperantaj prelegoj, kantoj, skeĉoj... Kunportu viajn amuzajn kanzonojn, ludojn, ktp. Eblas bankuracadi en proksima marakvoterapiejo.



Aliĝ-limdato : 2019/12/01 Poste... nur se plu restos lokoj!

ALIĜKOTIZO (ne repagebla) :

Plenkreskulo : 60 € Paro : 100 €

(senpaga por la malpli ol 18-jaraĝuloj)

Loĝado

Kompleta semajna restado (plenkreskulo) : x 360 € = €

Rabatebleco por infano (bv informiĝi) : x € = €

Suplemento por unulita ĉambro : x 110 € = €

Popersona suplemento por ĉambro almara : x 70 € = €

KURS-NIVelo

Mi partoprenos la kursaron : 1 2 3 4

Mi volas mem partopreni en programo per :

ALVENO

Trajne (St Raphaël) Fluge (Nico) Memveture

je la horo :

EVENTUALA MESAĜO :

RESUMPAGO

Aliĝkotizo €

Restado €

Tuta Sumo €

Sumo pagebla :

- **per ĉeko** je la nomo de "Esperanto club St Raphaël", sendota kun aliĝilo al: Christine Graissaguel, Les Iles d'or A, rue du Progrès, FR 83600 Fréjus, Francio)

- aŭ **per bankoĝiro** al :

Société Marseillaise de Crédit

IBAN: FR76 3007 7049 3926 6980 0020

041 BIC: SMCTFR2A ESPERANTO-CLUB-83700 ST RAPHAEL

